

Kelkfoje maltrafa

Ne ĉiam la nobelpremia komitato pravis. En la jaro 1903 ekzemple ricevis *Niels Ryberg Finsen* (1860 -1904) la premion por medicino – por tute nekonvinka terapio kontraŭ haŭttuberkulozo: li "terapiis" pacientojn per nura lumradio. En 1927 la nobeldistingon ricevis la viena *Julius Wagner von Jauregg* (1857-1940) por neutila kaj doloriga terapio de la sifilida progresiva paralizo. Laŭ la principo "forigi la diablon per alia diablo" li inokulis la malsanulojn per malario. La plej gravan maltrafon la komitato faris jam unu jaron antaŭe: tiam la premio estis atribuita al la dana patologo *Johannes Fibiger* (1867-1928). Tiu pensis ke li trovis la kaŭzon por kancero – nome iun filarion (t.e. longa nematoda vermo) kiel "malsanorespondeculon". (2003-10-17)

Mara purigejo


De ŝarko ĝis papiliofiŝetoj – ĉiuj kunvenas regule por belec- kaj purig-traktado al certa profundmara purigstacio. Tio estas rigardata kva-zaŭneŭtrala teritorio komuna, kaj eĉ la rabista klientaro tie ĉi treege ĝentilmaniere kondutas kun tiaj fiŝkolegoj, kiujn ili aliloke senpalpebrume formanĝus. Estas observite, ke ĉe tiaj purigstacioj povas eĉ regi interpremo kaj interpuŝiĝo, kaj oni devas "stari" en la vico de la atendantoj. Inter la flegadpersonaro rangas la "marhirundo" (germane: "*Meerschwalbe*", iu lipfiŝspecio) el la Hinda Pacifiko kiel speciale lerta kaj kapabla flegisto: ĝi priservas dum daŭro de nur 6 horoj 300 fiŝojn! Kiel servoj estas plenumataj: forigo de manĝorestaĵoj el la buŝo kaj de krustaceaj kankretoj de sur la haŭto, same kiel purigado de la internaj vandoj de la branĝoj. Ĉio senkoste! (2003-05-17/18)

Ligno pli forta ol ŝtalo - nesurflosebla kaj fajroeltena

La eŭkaliptospecio *Eucalyptus marginata* formas tiom densan kaj malmolan lignon, ke ĝi en marakvo alfondiĝas kaj en brulantaj konstruaĵoj suferas malpli da damaĝo ol ŝtalskafaldo. Aliaj eŭkaliptoarboj kapablas postvivi milojn da jaroj kaj havas trunkojn, kiuj bezonas por ĉirkaŭprenado la brakojn de almenaŭ naŭ viroj, kaj kreskas ĝis alteco de pli ol 100 metroj. Estas ja bone konate, ke koalo treege ŝatas kaj vivtenas sin ekskluzive per eŭkaliptofolioj – kiuj, tio estas malpli bone konata, enhavas kalicianidon. Tiu veneno disvolviĝis en la planto daŭre de la evoluado certe por protekti kontraŭ formanĝado per bestoj. Sed la koaloj ne nur kapablas neŭtraliĝi la cianidan acidon – ili eĉ bezonas tiujn 67%-akvoenhavajn foliojn. Ĉar koaloj ne trinkas akvon. Pro la unufoma eŭkaliptofolia nutrado ili odoras fakte kiel kontraŭtusaj lozanĝoj kaj ilia felo estas tiom saturita per la eteraj oleoj, ke eĉ laŭsoj kaj puloj mortas. (2003-11-18)

Ĉu dependas de "bela vortsono"?


Kiel la dulingvuloj sukcesas, diferencigi inter siaj du gepatraj lingvoj? Respondo: Ĉar ili evoluigas specialan "dulingvecan cerbovojon". Tion provis klarigi la studoj ĉe universitato de Bazelo, Svislando, kaj universitato de Magdeburgo, Germanio.



Bildo 1 : Dulingve elkreskinta

Dulingvuloj: danke al specialaj metodoj nuntempe eblas videbligi, kiuj cerboregionoj dum certaj aktivecoj estas aktivaj. La cerban aktivecon de "frua dulingvulo" (t.e. kiu lernis du lingvojn antaŭ la tria vivojaro kaj trian dum la lerneja tempo) montras Bildo 1: la aktivigo de la unua, dua kaj tria lingvoj kunfandiĝis en unusola "makulo" en la Broca-arealo (cirklo).

Unulingvuloj: ĉe testpersonoj, kiuj elkreskis unulingvaj kaj lernis duan kaj trian lingvojn nur en la lernejo, estas alia aspekto (Bildo 2): la aktivadoj de la unua, dua kaj tria lingvoj montriĝas tute alie dum supertavoligo: la unuopaj lingvoj troviĝas malsame laŭ makuletoj apartigitaj unu apud la alia en la Broca regiono (cirklo) pro la interfero.



Bildo 2 : Unulingve elkreskinta

Dulingve elkreskintaj homoj fasciniĝas pro la facileco, kun kiu ili – meze de frazo – senprobleme ŝanĝas de unu lingvo al la alia. Ŝajnas, ke la dulingvuloj jam pro "malĝusta aŭ maltipa vortsono" identigas vortojn kaj filtras ilin laŭ belsoneco kaj malbelsoneco. Tion eltrovis *Cordula Nitsche*, profesoro pri neŭroanatomio de la Bazela universitato, ĉe dulingvaj profesiaj tradukistoj. Dum la "simultana interpretado" aliaj cerboregionoj estas aktivaj ol dum senstreĉa normalmaniera babilado. Rezulto do: estas situacioj, en kiuj la cerbo zorgas, ke ĝi strikte diferencigas inter la du lingvoj. En aliaj malpli streĉaj situacioj ĝi reagis iom pli leĝere.

Duringve elkreskintaj homoj fasciniĝas pro la facileco, kun kiu ili – meze de frazo – senprobleme ŝanĝas de unu lingvo al la alia. Ŝajnas, ke la dulingvuloj jam pro "malĝusta aŭ maltipa vortsono" identigas vortojn kaj filtras ilin laŭ belsoneco kaj malbelsoneco. Tion eltrovis *Cordula Nitsche*, profesoro pri neŭroanatomio de la Bazela universitato, ĉe dulingvaj profesiaj tradukistoj. Dum la "simultana interpretado" aliaj cerboregionoj estas aktivaj ol dum senstreĉa normalmaniera babilado. Rezulto do: estas situacioj, en kiuj la cerbo zorgas, ke ĝi strikte diferencigas inter la du lingvoj. En aliaj malpli streĉaj situacioj ĝi reagis iom pli leĝere.

Do, estas situacioj, en kiuj la cerbo zorgas, ke ĝi strikte diferencigu inter la du lingvoj. Ĉu ekzistas filtro? La volontuloj (studentogrupo ekskluzive hispanlingva, kaj alia studentogrupo denaske hispana / katalunlingva) devis, kiel eble plej rapide, diferencigi inter hispanaj vortoj unuflanke kaj katalanaj aŭ tute ne ekzistantaj "pseŭdovortoj" aliflanke.

Ambaŭ grupoj preskaŭ samrapide kapablis elfiltri la hispanajn vortojn. Tute alia rezulto estis, kiam oni mezuris la "lateran preteco-potencialon" (LRP). Per elektra encefalogramo (EEG) la preteco por ago jam estas videbla antaŭ ol la ago mem – do la motora butonpremado – efektiviĝis. Nun la unulingvuloj estis pli rapide pretaj ol la dulingvuloj, premi la butonon tuj je apero de hispana vorto.

Poste oni analizis la "agokombinitan potencialon" (EKP) laŭ certa N400-efiko (kiu dependas de la semantika deveno de la vorto). Oni trovis, ke la ignorendaj katalunaj kaj pseŭdovortoj – sendepende de sia ofteco – tute ne kaŭzis reagon ĉe la dulingvuloj. La sciencistoj konkludis el tio, ke la dulingvuloj jam en tre frua aŭdstadio simple "forigas" tian "malbonsonan" vorton – sen fari iun ajn antaŭan "semantikan analizon". Ŝajnas, ke dulingvuloj tre frue eliminis "malĝuste sonantajn vortojn", sen ekzameni ilin laŭ signifo.

(Legita en *Nature*, Vol. 415 de 2002-02-28) – sa

Kio estas 1 litro e? ? e75ml 2Le

Plej ofte malantaŭ, iafoje antaŭ, tre malofte sub la indiko de volumo aŭ maso de enpakitaj varoj etcirkligas minuskla "e". Ĝi certigas la aĉetinton, ke la nomita pleniga kvanto konformas al la enhava kvanto. Nur bagatela parto (maksimume 15 el 1000 gramoj) rajtas malkonformi kun la indikita plenigkvanto. Validas la plenigvaloro je 20 gradoj laŭ Celsio.

Ĉu sekreta skribo? Al kio rilatas tiu ĉi minuskla e? Nu, ĝi rilatas al la direktivo n-ro 75/105/EWG de la Eŭropa Komisiono de la jaro 1974. Tiam la tiamaj membroŝtatoj de la iama Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK), la hodiaŭa Eŭropa Unio (EU), decidis ke en pakumo de varo ofertita por vendo fakte enestu tio, kio estas ekstere indikita.

La eta e antaŭ aŭ post, super aŭ sub iu ajn mezur-indiko do estas EEK-signo – e(ŭropo) – kaj per diven-kontroloj kaj laŭleĝa apliko zorgas (en Germanujo) la Landaj Ministerioj pri mezurado kaj normigado. La punmono por pekuloj tamen estas hontige modesta. (2001-03-02)

CONSERVAZIONE:
no dopo ogni utilizzo e conservare
l'astuccio all'asciutto.

375 g e

500g e

250g e

30%
R&T 1.7%

100g e

375g e

375g e

200ml e

2x375g =
750g e

Legantoleteroj

Pri "praknalo" en legantoletero (SR 4/2003. p.224)

"... La laika demando pri la neperceptebla fardo de la materio ricevis neatenditan konfirmon en lastatempa scienca aldonajo de la ĵurnalo "Nova Roterdama Ĵurnalo/Komercgazeto" (NRC-Handelsblad):

Ĉe alta temperaturo la energio de iu materio tiel kreskas, ke restas nur radiado, kiu malvarmiĝante refariĝas materio. (Ĉu laŭ kvantum-teorio lumo ne estas materi-baza?) Ĉu ankaŭ vi legis prie?

Mi proponas provizore – ĉar niaj scioj kresketadas kaj ni ankoraŭ ne scias, ĉu rilatas la nigraj truoj nek pri la rilato inter materio nek pri naturfortoj, t.e. energio – postulati kvar **agregajn statojn** (NPIV sub "agregi")¹: solida – flua – gasa – radia.²

Tio supozigas, ke la densega materio de nigra truo pravigus rangigi la nigrajn truojn "**maldekstre**" de la solida fazo. Sed kion opinias niaj veraj sciencistoj? ... " R.M., Nederlando*

¹ (Etimologio: greko estas kunigita bestaro (eksploatata): temas pri la grado de denseco, kompakteco de la materio.)

² La nomado de fenomenoj en Biblia Genezo ebligis ordigi, komenci pensi "science".

Pri "sindonema / sidonema" (SR 4/2003, p. 176, linio +4)

"... Foje homoj, kiuj ne havas laboron multe enspezan aŭ mult-enspezan ("kun multa enspezo"), malesperas kaj mortigas sin mem.

Jes, "sin mem", sed la afero mem estis "**simortiga**", ĉar ĝi instigis al la mortigo **de si mem** kaj la radikoj estas "**si**" kaj "**mortiga**".

Kelkaj uzas en tiu ĉi kazo (cetere "tiuĉikaze") memmortigo/a, kio estas same bone formita kaj **evitas la akuzativan -n en kunmetaĵo**. Kaj same kiel "memdone", kiel mortinta amiko finis letere siajn lingvajn rekomendojn al mi.

Li ankaŭ povus skribi "sidone", ĉar li donis **iom de si mem**. Nun ankaŭ mi, ja kontraŭvole, do "sidone" aŭ "memdone", eĉ sidoneme, reagis al tiaj oftaj misaj tradiciaĵoj, ĉar mi ŝatus lerni, regi, legi kaj transdoni unuecan lingvon kaj lingvaĵon ... " H.G.R., Germanujo*

* nomo kaj adreso konata al SR-redakcio